

LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA DE LA KLUBO ESPERANTISTA EN UPPSALA.

Kosto de abono por jaro:	Pago por anoncoj:
kronoj 3,00 = germ. markoj 3,30 = cendoj 75	15 öre = 15 pfenigoj = 20 centimoj =
= frankoj 4,25 = rejsoj 1000 = rubloj 1,50.	8 kopekoj — por duonpaĝa petitlinio.

Adreso de la redakcio: *Klubo Esperantista, Uppsala, Sverige.* (Svedujo.)

III:a jaro.

Marto 1898.

N:o 3 (27).

Lev Davidoviĉ †.

La 20-an de decembro 1897 mortis en Odessa unu el niaj plej fidelaj amikoj — la instruisto kaj ne malkonata hebrea literaturisto, Lev Davidoviĉ, pli konata al la leganta hebrea publiko sub la pseŭdonomo "Ben-David". La mortinta dum multaj jaroj skribis multajn artikolojn en gazetoj kaj ĵurnaloj hebreaj kaj rusa-hebreaj; li ankaŭ tradukis la libron de Spencer pri la edukado en la lingvon antikva-hebrean. Li multe faris por la reviviĝo kaj reformiĝo de la antikva lingvo de l' biblio en la manieron de l' vivantaj eŭropaj lingvoj, kaj fondis en Rusujo la unuan klubon por parolado en tiu lingvo antikva. Liaj talentoplenaj artikoloj pedagogiaj kaj kritikaj altiris al li la atenton de la plej progresema parto de la legantoj kaj lia nomo fariĝis tre populara.


Lia tuta mallonga vivo estis vera batalado por progreso kaj idealoj. Resonante je ĉiuj veraj progresaj kaj idealaj verkoj, li estis ankaŭ fidela esperantisto dum lastaj jaroj kaj partoprenis en la laboroj de la odesa esperantistaro por la traduko de l'Biblio en la lingvon Esperanto senpere el la hebrea originalo. Lia antaŭtempa morto en la aĝo de 42 jaroj prokrastis tiun ĉi entreprenon.

Post li restis du malgrandaj filinoj sen rimedoj por ekzisti.

La odesa esperantistaro longe konservados kun plej viva kundoloro la rememoron pri sia fidela kaj utila kolego, kaj mi persone priploros la mortinton trioble: kiel amikon, kiel esperantiston kaj kiel verkiston hebrean.

Pacon al via cindro, kara ideala suferanta amiko kaj kolego!...

N. Sloušć.



Al ĉiuj esperantistoj,

kiuj ne havas malvarman koron, mi deziras direkti sekvantajn vortojn, sekvantan demandon.

Ĉu ni, esperantistoj, kiuj batalas por unu granda kaj bona ideo, nenion ŝuldas al homo, kiu dediĉis sian vivon kaj siajn fortojn al la sama aŭ simila laboro?

Ŝajnas al mi, ke ni devas ĉiuj respondi jes.

Kaj ankaŭ ŝajnas al mi, ke neniu bona esperantisto povas tralegi la mallongan sed tuŝantan historion pri mortinta Lev Davidoviĉ [vidu en tiu ĉi n:o p. 33] sen sentoj iom similaj al tiuj kun kiuj mi ĝin tralegis.

Kion mi do sentis? Dankecon kontraŭ tiu homo kiu laboris senlace por la ideoj, kiuj ŝajnis al li bonaj, kaj kiu ne zorgis pri "la bonoj de l' mondo", nur pri la laboro kiun li kalkulis sia. Dankecon kontraŭ lia amiko, kiu lin priskribis al ni tiel simpatie, simple kaj kortuŝante. Dankecon al la homaro kiu ankoraŭ naskas inter ni, la infanoj de malfruaĵ tempoj, homojn tielajn, homojn kiuj scias labori ne kalkulante la frukton, la rekompenccon de la laboro. — Kaj fine mi sentis kompaton, profundan koran kompaton, kiam mi legis la simplajn liniojn: Post li restis du malgrandaj filinoj sen rimedo por ekzisti.

Kaj jen, precize al tiu ĉi kompato mi volus doni esprimon, kaj mi sentas kaj scias ke mi nun parolas en la nomo de multaj kunideanoj.

Sed kompato nenian bonon faras, se ĝi ne estas sekvita per agado. Tial ni agu, kaj ni agu tuj!

La esperantistoj — tiu estas mia propono — prenu sur sin la zorgon pri akiro de mono por la edukado de tiuj ĉi du knabinoj ĝis, ekz., 18 jaroj de aĝo.

Tio estas preskaŭ nia devo, kaj se ne nia devo tamen nobla ago, kiu estas inda al homoj kiuj nomas sin Esperantistoj.

Tio cetere ne estas tre malfacila, ĉar ni estas tiom multaj ke ni povos doni po malmulte sed tamen akiri grandan rezulton. Multaj inter ni estas malriĉaj, sed kelkaj sufiĉe riĉaj — ili donu po pli multe. Sed ĉiu povas ion doni aŭ inter siaj konatoj ion kolekti.


Tiel estos la filinoj de mortinta "**Ben-David**" de nun la filinoj de la tuta esperantistaro. La zorgant-patrino estas la Odesa Filio de l' societo Espero, kiu sendube ne rifuzos gardi la oferotan monon kaj zorgi pri ĝia elpagado.

Kolegoj, amikoj! Mi ne bezonas diri, ke per tia agado ni altiros al ni la estimon de ĉiuj bonaj homoj ne-esperantistoj, kiuj aŭdos pri ĝi kaj kiuj pli multe interesigos je nia afero vidante tielajn bonajn, belajn fruktojn de ĝi. Mi ne bezonas tion ĉi diri, ĉar sen tio niaj bonaj esperantistoj, aŭskultante la voĉon de siaj koroj, sendube mem agos.

Mem mi transsendas tuj al la Odesa Filio Espero certan malgrandan sumon, kaj promesas tuj post la pretigo de mia komencita libro pri Rusujo el mia salajro sendi la duoblan sumon kaj dum 1899 kaj sekvantaj jaroj sendi laŭforte similajn sumojn ĝis la tempo, kiam la filinoj de la esperantistaro jam povos mem akiri la necesan por la pano monon.

Uppsala 25 Marto 1898.

Valdemar Langlet.



Novajoj.

Junulara societo por esperanta korespondado.

Nia agema sveda amiko v. Sydow skribas al la klubo Esp. en U. interalie la jenan: "La junaj unufoje estos viroj, kiuj havos grandan influon. Kial do ne per ĉiuj fortoj disvastigi nian lingvon inter ili, dum ili ankoraŭ estas entuziasmigataj de grandaj celoj? La plej bona rimedo por disvastigado de la lingvo inter la junaj estas korespondado. Ĝi igas ilin lerni la lingvon kaj donas al ili ĉiam novan intereson por ĝi. La korespondado tial devas esti kiel eble plej multe plifaciligata por ili." — Tiel mi pensis kaj faris tial kun helpo de la junulara gazeto "Kamraten" klubon por ebligi korespondadon. Mi ĝin nomis "J. E." (Junaj Esperantistoj). — La klubo ankoraŭ nur havas 20 membrojn. Ĝi havas tri rondojn, ĉiu kun sia estro. (Laŭ la regularo la klubo estas partigita en kelkaj rondoj, ĉiu kun ne pli multaj membroj ol 10 sed ne malpli multaj ol 5. Ĉiu rondo havas sian estron, kiu al la rondanoj korektas tradukojn, respondas demandojn k. t. p. La rondestroj faras kune komitaton). — La unua paragrafo de la regularo diras: "J. E." havas la celon 1) labori por la vastigado de la lingvo internacia Esperanto precipe inter la junaj, 2) per korespondado ligi la junajn esperantistojn, 3) doni instruon kaj respondi demandojn pri la lingvo kaj 4) ebligi al la membro internacian korespondadon.

* * *

La 31-an de oktobro 1897 mortis, kaj la 4-an de novembro estis enterigita unu el la plej varmaj amikoj de nia lingvo — *Kornelius Hübert* en Aleksandrovsk (Rusujo) en la aĝo de 62 jaroj. En lia persono nia afero perdis fervoran laboriston por la disvastigado de la lingvo Esperanto. Pacon al lia cindro!

* * *

S-ro V. Gernet petas nin presi la sekvantan leteron, kiun li ricevis de s-ro W. H. Trompeter.

"Schalke, 1 de februaro 1898.

Kara Amiko Gernet!

En la jaro 1900, se mi nur vivos sane, mi vizitos Parizon. Sendube multaj esperantistoj havas la saman intencon. Trovi tie kelkajn esperantajn amikojn — estos por multaj, kiel por mi, pli grava, ol la tuta ekspozicio kaj eĉ ol la urbo Parizo. Tial mi proponas, ke ni aranĝu kongreson de esperantistoj en aŭgusto aŭ septembro 1900 en Parizo. Estus dezirinda, ke ni havu tiom da partoprenantoj, ke oni povu presigi en Esperanto libron kondukan por la urbo kaj ekspozicio. Ĉar mi neniam en vojaĝoj kunportas duan vestaĵon, mi jam nun diras, ke mi aperos en la kongreso en mia ordinara vojaĝa vestaĵo. Estus bona, ke ni jam nun komencu la aranĝadon, ĉar multaj sendube volos antaŭe ekzerci la buŝan paroladon en Esperanto. Se la aranĝado kostos monon, mi volonte pagos ion. — Espere multaj esperantistoj, kiuj per Esperanto fariĝis amikoj, havos en la jaro 1900 la ĝojon ekkoni persone unu la alian kaj reciproke premi la manojn. — Havu, kara amiko, la bonecon presigi mian proponon en "Lingvo Internacia".

Koran saluton de Via W. H. Trompeter."

* * *

La Odesa Filio de la Societo "Espero" dissendis al ĉiuj kluboj esperantistaj la sekvantan proponon:

"La Komitato de la Odesa Filio de la Societo "Espero" en S-Peterburgo, en kunveno de 15-a de januaro 1898, decidis proponi la al Komitato de la estonta medicina Kongreso en Parizo en 1900 enkonduki la lingvon "Esperanto" en la nombron da lingvoj, permesitaj en la Kongreso por raportoj kaj disputoj.

"Pensante, ke ju pli da societoj esperantistaj el diversaj landoj adresos similan peton la al prezidanto de la estonta Kongreso, s-ro d-ro Lannelong, des pli certa estos la sukceso de la peto, la Komitato de la Odesa Filio de la Societo "Espero" proponas al la estimata Klubo en NN sendi la saman peton kaj sciigi pri tio la Odesan Filion de "Espero".

Prezidanto: D-ro *V. Filipoviĉ*. Sekretario: *V. Gernet*."

* * *

"Espero".

En kunveno de 4/16 de Januaro la societo "Espero" laŭ estinta komuna balotado decidis preni sur sin la administradon de kapitalo de D-ro Zamenhof kaj laŭ lia konsilo presi antaŭ ĉio lernolibrojn anglajn kaj italajn.

La societo invitas ĉiujn dezirantajn oferi ion por tiu ĉi celo, sendadi siajn oferojn en mono aŭ en poŝtsignoj laŭ adreso de s-ro K. Ostanieviĉ, Russie Petersburg, station télégraphique Centrale. Kalkula raporto estos presita en maja numero de L. I.

Prezidanto: *F. Postnikov* Sekretario: *K. Ostanieviĉ*.

* * *

Por la efektivigo de l' propono de s-ro A. Grünfeld (rig. L. I. n-ro 24) donacis s-ro *Aŭg. Th. Laurén* (Uleåborg) 6 finn. mk (= 4,20 kr.).

* * *

El Göteborg ni ricevis kun plezuro la sciigon pri la fondiĝo de "Göteborgs Esperanto-Sällskap" — la Göteborga Esperantista Societo —, kiu naskiĝis jam en la fino de l' pasinta jaro. La reganta komitato de la societo konsistas de: prezidanto — Erik Börjeson, kasisto — Harald Franzén, sekretario — Algot Friman (adr.: Lorenskatan 3, III), kaj bibliotekisto — Oskar Blomdahl; anstataŭuloj estas: por la prezidanto — Otto Lindberg, kaj por la sekretario — Anders Backman.

La Göteborga societo havas honorajn, pasivajn kaj aktivajn membrojn, kaj por fariĝi aktiva oni devas prezenti certan ekzamenon de Esperanto ĉe la societa komitato.

Tiu ĉi societo estis nekonata al la personoj, projektintaj en la komenco de Marto la fondon de Esperanta klubo en la sama urbo; kaj ni esperas, ke post mallonga tempo ekzistos du vivaj, energiaj kluboj en Göteborg.

* * *

Pri unu nova klubo la redakcio ricevis la sekvantan leteron:

Mi ĝojas povi rakonti al Vi, ke la 12-an de Febr. formiĝis ĉe mi en mia hejmo "la Rondeto Esperantista de Sela"; estron oni elektis min, sekretario fr:ino E. Tidstrand kaj kasiston fr:ino E. Brehmer. El tiuj elektoj oni povus eble konkludi, ke la "virina demando" treege progresis sur nia insulo!

Sed tute ne estas tiel — mi eĉ forte suspektas, ke tiu ĉi “demando brulanta” ankoraŭ ne ekaperis ĉe ni! Oni nin elektis nur tial, ke nia juna societo kalkulas nur virinajn membrojn.

Ni intencas aranĝi kunvenojn ĉiumonate, kaj decidis malgrandan jarpagon, kiun ni uzos ĉefe por propagandado.

La membroj de nia eta rondeto ne estas multaj, sed ili estas fervoraj, ili amegas nian karan lingvon kaj laŭforte laborados por ĝia disvastigado.


— Kun alta estimo Fraŭlino *Hilda Cederblad*.

(Agento de Esp.) en Fröberga, *Öferselö* (Svedujo).

* * *

Pri Esperanto parolis. En N-ro 53 de la sveda gazeto ĉiutaga “*Göteborgs Handels- och Sjöfartstidning*” oni legis anoncon, ke la esperantistoj en Göteborg kaj aliaj personoj interesantaj sin je Esperanto kunvenu por pripensi la fondon de esperantista klubo; kaj simpatian noticon pri la lingvo Esperanto. N-ro 54 de la sama gazeto enhavis artikolon pri la nomita kunveno, ĉe kiu “la invitinto, la ĵurnalisto G. Siösteen, mallonge parolis pri la naskiĝo kaj disvolviĝo de la ideo de tutmonda lingvo. — La alestantoj decidis ree kunveni post kelke da tempo por fondi klubon.” — Por la svedaj gazetoj *Luleposten* n-roj 24 kaj 26, kaj n-ro 17 de *Norrbottnens Allehandu* s-ro Hjalmar Bäckström verkis bonajn artikolojn propagandajn.

“*O Philatelisto do Occidente*”, internacia publikajo por kolektistoj de poŝtaj markoj, eldonata en Porto, Portugalujo, ĉefe en portugala lingvo, uzas ankaŭ nian lingvon kaj akceptadas korespondon, krom en lingvoj franca, hispana, angla kaj itala, ankaŭ en Esperanto. La gazeto estas interesa eĉ por ne-filatelistoj.



La vesperstelo.

Mi konis grandan saĝulon, kies nomo estis tre glorita en la scienca mondo.

Li kalkulis la kuron de la steloj kaj li trovis novajn mondojn en la firmamento, de kiuj la movojn en la spaco li kalkulis. La akreco de lia cerbo ŝajnis esti superhoma al mi kaj mi admiris ĝin.

Ne vidinte lin delonge, mi nur aŭdis pri liaj senekzemplaj sukcesoj.

La okazo volis, ke ni nin trafis en izolita vilaĝo de la bavaruja montaro. — Mi terurigiĝis je lia aĝita, laca eksterajo.

Lia sola filo mortis al li antaŭ mallonga tempo kaj lia edzino antaŭiris al ŝia ido je morto en la sama jaro.

Ni iris kune en la mont-arbaro kaj sidiĝis sur antaŭsaltanta rifo. —

La plifruo tiel movema viro estis farita tre unusilaba kaj silenta; lia malgaja okulo ĝojiĝis nur en momentoj, se li vidis sian malgrandan flineton, kiu obeeme iris kun ni kaj nun sidiĝis apud la patro, ludante je malgrandaj ŝtonetoj kaj floroj.

Ekmallumiĝis jam kaj inter la ambaŭ pintoj de la “Limkorno” kaj de la “Fojnmonto”, kies konturoj precize diferencigis kontraŭ la ĉielo blumalblanda, io eklumetis apenaŭ videble. — Ĝi estis la ŝajno de la vesperstelo, kiu baldaŭ fariĝis pli kaj pli klara kaj transradiis al ni en kvieta brilo.

“Vidu, mia patro, kiel hele ĝi brilas tie”, la malgranda knabino suobite ekparolis, montrante ekscite kun siaj manetoj al la stelo.


“Mi hieraŭ vidis en revo belan anĝelon kun blankaj, grandaj flugiloj; li venante al mi kisis min, sed kiam li min kisis, li ne estis plue anĝelo, sed la malgranda Karlo. Grandajn blankajn flugilojn li havis tamen, mi vidis precize ĝin; kaj li diris al mi, ke li venis de la luma granda stelo kaj ke li

ankaŭ ree refugos tien, ĉar tie, diris la malgranda Karlo, estis multe pli bela, ol en la malluma tero; kaj la amata patrino estas ankaŭ en la stelo, transsalutante al ni ĉian vesperon. Sed la malgranda Karlo ne diris al mi, de kia stelo li venis kaj kiam mi volis demandi lin, tiam li etendante siajn blankajn flugilojn grandajn forflugis al la ĉielo! —

Ĉu ĝi estas nun tiu ĉi stelo, amegata patreto, de kiu la malgranda Karlo venis? Vi ja konas ĉiajn stelojn?“ —

“Amata mia idino“, respondis la laca viro, kaj lia voĉo ekstremis, “mi ne scias ĝin. Eble — eble la malgranda Karlo venos ankoraŭ fojon al vi, se vi bele preĝas al Dio ĉiuvespere, li eble povos diri ĝin al vi — — — la malgranda Karlo konas la stelojn nun multe, multe pli bone ol mi — —.“

Tradukis D:ro Ebner.




Al Anĝelo.

Ho, sankta Sendito de Pastro Ĉiela,
Deiru al mi vi, Anĝelo!
Mi estas malsana, doloras animo
Kaj ĝin ĉirkaŭprenas la timo;
En koro pleniĝas perea veneno;
Min savu per sia vi veno.
Mi perdas la kredon, min duboj ĉirkaŭas,

De ĉie teruron mi havas.
Deiru al mi vi, ho, mia Anĝelo,
Sendito de Sankta Ĉielo:
En via alesto por koro mi trovos,
Ja kion mi trovi ne povos
Sur vojo la tera necerta kaj glita,
En vivo tre frue rompita.

Dmitri Jegorov.



Tri suboficiroj.

Komedio en unu akto. (El greka lingvo).

Personoj: PASHALO — suboficiro de la infanterio.
ZAFIRO — suboficiro de la kavalerio.
FORVAS — suboficiro de la artilerio.
MARIETA — ilia amatino.

Sceno 1. Placo. Dekstre la domo de Marieta.

PASHALO: Ha, friponoj, azenoj! Mi rompos al vi la kapojn! Malbenitaj tiuj-ĉi soldatoj! eĉ unu minuton ne lasas min en trankvilo, ĉiam malhelpas min; sed ili trovos min iam en malbona horo, kaj mi kalkulos al ili ripojn. Ili tute forĝesis la disciplinon kaj nek mian rangon estimas, nek mian personon timas. Tamen mi povas malfrui, mi devas iri al mia amata Marieta: ŝi atendas min, sendube, ĉiun minuton. (*Li alproksimiĝas al la fenestro kaj vokas*). Marieta! Marieta! Jen ŝi iras. Kiel ŝi estas bela! la okuloj, brovoj, talio, la tuta figuro... Se ŝi estus fandita en la formon, ŝi ne estus pli bela.

Sceno 2.

PASHALO: Venu, alproksimiĝu al mi, animo de mia animo! Konsolu min iom! Diru al mi, ke vi min amas.

MARIETA: Mia tre kara Pashalo! Vi estas stranga! Vi jam dubas pri mia amo; ne trairas unu minuto, ke mi ne rememoru vin, kaj nun, kiam

mi ekvidis vin de malproksime, mi kuris al la pordo kaj atendis vin senpacience. Vi estas sola objekto de miaj esperoj, kaj se vi ne rapidigos nian edziĝon, mi mortos (*ŝi ploras*).

PASHALO: Malfeliĉa! Kun kia delikateco ŝi esprimas siajn sentojn! Ne ploru, mia amata, mi ne dubas, ke vi min amas, en tio-ĉi mi estas konvinkita.

MARIETA: Mia Pashalo, unu demando, sed povas esti, ĝi estos al vi malagrabla.

PASHALO: Diru, mia amata, kion vi volas.

MARIETA: Ĉu vi parolis kun mia frato?

PASHALO: Por kia celo? Ĉu mi volas edziĝi kun li?

MARIETA (*Al si*): Ĉiam la ŝercoj! — (*Laiite*) Ĉu vi ricevis lian konsenton por nia edziĝo?

PASHALO: Kiun aferon mi havas al via frato? Ĉu mi devas peti lian permeson? Nur tio-ĉi mankas!

MARIETA (*ploras*): Tio-ĉi ne povas esti alie.

PASHALO: Estu tiel, mia pupo! Ne ploru. Apenaŭ mi ricevos mian salajron, mi parolos kun via frato. Nun iru, estu trankvila. Vespere ni nin revidos.

MARIETA: Memoru viajn promesojn! Adiaŭ, mia kara.

PASHALO: Kiel mi estos feliĉa, kiam ŝi estos mia edzino! Nun mi kuros al majoro, por devigi lin eldoni al mi salajron; alie mi min turnos al generalo, al ministraĵo, fine al la reĝo!

Sceno 3. Zafiro kaj Pashalo.

ZAFIRO: Kiel vi fartas, Pashalo? Ĉu vi sentas vin bone?

PASHALO: Ne, mi sentas min ne tre bone.

ZAFIRO: Sed mi neniam sentis min tiel bone, kiel nun. Mi manĝas, kion mi volas, trinkas tiom, ke mi ŝvelas kaj ne povas moviĝi; mia poŝo estas ĉiam plena.

PASHALO: Sed kie, al diablo, vi trovas la monon?

ZAFIRO: Vi estas malsaĝa, mia bona! Vi scias, ke mi aĉetas ĉiutage provizon por la soldatoj.

PASHALO: Sed kio estas en tio?

ZAFIRO: Aŭskultu do, malsaĝa homo! Mi aĉetas, ekzemple, rizon. En la kalkulo mi skribas 10 funtojn, sed efektive mi aĉetas nur 7.

PASHALO: Sekve vi ŝtelas 3 funtojn. Tio-ĉi estas bone, sed kiamaniere via estro ne rimarkas tion-ĉi?

ZAFIRO: Efektive, vi estas malsaĝa! Al rizo mi almetas salon kun akvo; tiamaniere mi plenigos la mankon.

PASHALO: Sed de la viando, kredeble, vi ne povas ŝteli.

ZAFIRO: De viando nome mi ricevas la plej grandan profiton. Mi aĉetas ĝin antaŭ 2 tagoj kaj metas en akvon, ĝi ŝvelas, kaj anstataŭ la manko fariĝas eĉ tromulto.

PASHALO: Brave! Sed el tio, mi pensas, oni ne povas ricevi grandan profiton.

ZAFIRO: Ĉu vi volas scii ĉion? Vi ne kalkulas la soldatojn, kiuj estas forlasitaj kaj mortintaj.

PASHALO: Nu?

ZAFIRO: Ho, malsaĝulo! Ĉiujn dokumentojn de tiu-ĉi speco mi glutas.
PASĤALO: Vi estas efektive terura ŝtelisto. Sed mi trovas vian feliĉon kompare kun mia tre malgrandan.

ZAFIRO: Ni aŭskultu, kia estas via feliĉo.

PASĤALO: Mi havas amatinon, kiun se vi vidus, vi restus sur unu loko kun malfermita buŝo, kiel cikonio.

ZAFIRO: Mi ankaŭ havas amatinon, kiu freneziĝas pro amo al mi. Se vi vidus ŝin, vi havus paroksismojn.

PASĤALO: Kaj se vi vidus mian amatinon, vi havus nervajn spazmojn.

ZAFIRO: Mia amatino havas unu okulon...

PASĤALO: Sekve, ŝi estas unuokula! ĥa, ĥa, ĥa!

ZAFIRO: Ne, malsaĝulo, mi volas diri, ke ŝia okulo altiras ĉiujn korojn.

PASĤALO: Sed mia amatino havas la talion tiel maldikan, kiel la ringo.

ZAFIRO: Mia amatino havas haron, kaj kiun haron!

PASĤALO: Ĥa, ĥa, ĥa! sekve, ŝi estas senhara!

ZAFIRO: Ne, besto, mi volas diri, ke ŝia haro estas kiel oro. Mi montras al vi ŝin, kaj vi mem konvinkiĝos, ke tio-ĉi estas vera.

PASĤALO: Kaj mi prezentos vin al la mia poste.

ZAFIRO: Ne, montru antaŭe la vian, kaj poste mi montras la mian.

PASĤALO: Estu tiel. Mi iros kaj vokos ŝin.

ZAFIRO: He, kien vi iras?

PASĤALO: Ŝi loĝas tie, mi iros kaj vokos ŝin.

ZAFIRO: Vi eraras, mia amiko, tie loĝas la mia.

PASĤALO: Iru for! Tie loĝas mia amata.

ZAFIRO: Iru al diablo! tie estas loĝejo de mia amata.

PASĤALO: Ni ĉesu insulti unu alian. Kiel sin nomas via amatino?

ZAFIRO: Marieta, la fratino de nia liveranto.

PASĤALO: Marieta, la fratino de nia liveranto?!

ZAFIRO: Jes, Marieta. Ŝi tiel min amas, ke freneziĝas.

PASĤALO: Kaj vi ne hontas diri tion-ĉi? Ŝi amas min.

ZAFIRO: Marieta? Tio-ĉi estas neeble! Kiu diablo!

PASĤALO: Ŝi freneziĝas pro amo al mi.

ZAFIRO: Ne, ŝi mortas pro amo al mi.

PASĤALO: Se mi mem ne vidos kaj ne aŭdos ĝin, mi ne kredos.

ZAFIRO: Mi pruvos tion-ĉi tre simple. Kaŝu vin post la angulo, kaj vi vidos kaj aŭdos.

PASĤALO: Ne, kaŝu vi vin, kaj mi vokos ŝin.

ZAFIRO: Kaŝu vi vin antaŭe, kaj poste mi.

PASĤALO: Tiel estu. Sed poste vi devas vin kaŝi.

ZAFIRO: Iru nun, kaŝu vin. (*Pasĥalo sin kaŝas, kaj Zafiro iras al la loĝejo de Marieta kaj vokas ŝin.*)

Sceno 4.

MARIETA: Kiu estas tie?

ZAFIRO: Mi estas, mia animo.

MARIETA: Ha, tie estas vi, mia kara Zafiro.

ZAFIRO (*Al ŝi*): Aŭskultu, malsaĝulo! — (*Al Marieta*). Venu, mi vin ĉirkaŭprenos, mia amata.

MARIETA: Kial vi ne venis dum tiom da tempo? Mi sentis grandan malĝojon.

ZAFIRO (*Al si*): Ĉu vi aŭdas, malsaĝa besto? (*Laŭte*) — Mi ne havis tempon, mia kara, mi havis aferon.

MARIETA: Vi scias, kiel mi amas vin. Mi ne povas resti sen vi eĉ unu horon.

ZAFIRO (*Al si*): Ĉu vi aŭdas, idioto? (*Laŭte*) Jes, mia kara, mi ankaŭ sentas en mia koro tian doloron, ke ĝi min mortigos, se mi ne vidos vin.

MARIETA: Kiam do vi decidis, ke estu nia edziĝo?

ZAFIRO (*Al si*): Aŭskultu, tartufo! (*Laŭte*). Mi estas preta kiam vi volas.

MARIETA: Iru kaj preparu ĉion al nia edziĝo, ke ĝi estu hodiaŭ vespere.

ZAFIRO: Estu trankvila, mi jam zorgis pri tio, kaj ĉio estas preta. Adiaŭ, mia kara. — Venu tien-ĉi, sencerba homo! Kial vi rigidiĝis, kiel trempita kato? Nun vi aŭdis ĉion per viaj propraj oreloj. Ĉu vi konvinkiĝis?

PASHALO: Mi bezonas iom da akvo, ĉar mi svenos.

ZAFIRO: Kian akvon? Adiaŭ!

PASHALO: Haltu, haltu! kien vi iras?

ZAFIRO: Kien mi iras? Ĉu vi ne aŭdis, kion ŝi diris al mi? Mi iras por prepari ĉion al edziĝo.

PASHALO: Vi forgesis, ke vi devas ankaŭ vin kaŝi.

ZAFIRO: Min kaŝi? Estu tiel. Sed vi laboros senutile. Tamen faru pli rapide, mi ne havas tempon.

PASHALO: Kaŝu vin en tiu sama loko, por ke vi vidu, ĉu mi laboros senutile.

ZAFIRO: Nu, mi min kaŝis (*Pashaĉo iras al la fenestro kaj vokas Marietan*).

Sceno 5.

MARIETA: Estu bonveninta, mia kara Pashaĉo. Kion vi faris? Ĉu vi ricevis salajron? Ĉu vi parolis kun mia frato?

PASHALO (*Al si*): Aŭskultu, malsaĝulo! (*Laŭte*) Jes, mia lumo, mi penas ĉiam konvinki mian estron, ke li eldonu al mi salajron, por ke mi aĉetu ĉion necesan por la edziĝo.

MARIETA: Al mi ŝajnas, ke oni min vokas. Adiaŭ, Pashaĉo, ne forgesu vian fidelan Marietan, morgaŭ ni edziĝos.

PASHALO: Adiaŭ, mia kara, mia lumo. — Kaj mi dubis, ke ŝi min amas. Ŝi estas tute mia, per animo kaj korpo.

ZAFIRO (*frotante siajn okulojn*): Kiu diablo! Ĉu mi songas? Ĉu mi dormas?

PASHALO: Nu, ĉu vi multe gajnis, kolego?

ZAFIRO: Ha, malfidela! Mi mortigos ŝin.

PASHALO: Vi mortigos ŝin? Ni rigardu, kiu permesos al vi.

ZAFIRO: Al mi ŝajnas, ke ŝi aŭ trompas nin ambaŭ, aŭ amas ambaŭ. Povas esti, niaj belecoj ĉarmis ŝin. Sekve, necese estas, ke ni ambaŭ lasu ŝin, aŭ unu el ni devas iri for.

PASHALO: Estas pli bone, ke ni lasu ŝin ambaŭ, ĉar ŝi havas nenian konstantecon. Sed mi aŭdas paŝojn. Iu venas. Ho! tio-ĉi estas suboficiro de l' artilerio Forvas.

ZAFIRO: Jes, tio-ĉi estas li. Li iras tien-ĉi. Ni nin kaŝu kaj rigardu, kien li iras.

Sceno 6.

FORVAS: Fine mi trovis tempon por vidi mian karan Marietan. (*Li aliras al la domo kaj vokas Marietan*).

PASHALO: Jen, la tria!

Sceno 7.

MARIETA: Brave, Forvas! Kie estas viaj promesoj? Tia estas via profunda amo? Vi lasis min daŭrante la tuta monato!

FORVAS: Vi estas prava en viaj plendoj, mia kara, sed mi tute ne havis tempon pro mia ofico. Por estonta tempo mi promesas viziti vin pli regule. Sed diru al mi veron, ĉu vi ne ĉesis min ami?

MARIETA: Por mi estas superflue esprimi miajn sentojn. Vi scias, kiajn oferojn mi preta estas fari por vi.

FORVAS: Rilate la edziĝo estu certa. Mi jam prezentis mian petskribon kaj esperas ricevi baldaŭ la permeson.

MARIETA: Ha, kiam venos tiu-ĉi horo? Mi povas morti!

FORVAS: Sed al mi oni diris, ke vi havas aliajn amatojn.

MARIETA: Mi? Kiujn?

FORVAS: Unu estas Pashalo.

MARIETA: Mi? Pashalon? la nudpiedan malsaĝulon?

PASHALO: Ho, malbenita.

FORVAS: Oni diras, ke mi devas ankaŭ min gardi Zafiron.

MARIETA: Ĉu vi povas havi tian opinion pri mi? Mi? Zafiron? tiun malbonodoran, senŝtrumpan homon? Mi ne povas lin eĉ vidi.

ZAFIRO: Mi ne povas suferi plu! Mi ŝin disŝiros en pecojn!

MARIETA: Mi aŭdas paŝojn. Iu venas, mi devas iri for.

PASHALO: Haltu, haltu! ne iru for! Pashalo nudpieda?

ZAFIRO: Zafiro senŝtrumpa?

FORVAS: Kion signifas tio-ĉi! Klarigu al mi.

MARIETA: La krioj estas senutilaj. Aŭskultu, sinjoroj! Mia onklino mortante donis al mi sekvantan instruon: "mia infano", diris ŝi, "se vi volas vivi en la mondo feliĉe, vi devas ĉiam havi 9 amatojn kaj elekti la plej malbelan."

FORVAS (*farante grimasojn por ŝajni malbela*): Elektu min, mi estas malbela. (*Pashalo kaj Zafiro faras kaj diras tion saman*).

MARIETA: Kiel mi vidas, vi estas ĉiuj tri malbelaj. Tial vi devas fari alion: kiel kavaliroj, vi devas batali en duelo, kaj kiu restos viva, tiu havos min edzinon.

PASHALO: Kaj se ni ĉiuj tri estos mortigitaj?

MARIETA: Feliĉan vojaĝon! Tiam al mi restos aliaj 6. Mi foriros kaj baldaŭ revenos, por scii, kian decidon vi prenis.

PASHALO: Kiel tio-ĉi plaĉas al vi? Ŝi havas aliajn 6 en rezervo! Ni lasu ŝin kaj ne mortigu unu la alian pro la mensoga virino.

FORVAS: Ne, mi ne estas konsenta. Mi preferas duelon. Kaj vi Zafiro?

ZAFIRO: Mi estas ankaŭ konsenta kun vi.

PASHALO: Sekve, ni devas batali por la malmorala kaj malkonstanta virino, kiu mokas nin ĉiujn? Estu tiel. Sed per kiu batalilo ni devas batali?

ZAFIRO: Bela demando! Per la glavoj!

PASHALO: Tre bone. Sekve, eltiru la glavojn!

ZAFIRO kaj FORVAS: Antaŭen! Eltiru la glavojn!

PASHALO: Haltu, haltu! Sed la glavoj ja tranĉas!

ZAFIRO: Certe.

PASHALO: Tio-ĉi ne plaĉas al mi. Vi povas fari al mi ian signon sur la vizaĝo. Mi dankas multe. Ni batalu per io alia.

ZAFIRO: Se vi volas, ni povas batali per pistoloj.

PASHALO: Sed per kio la pistoloj estos ŝargitaj? per kuglo aŭ papero?

ZAFIRO: Mi vidas, ke vi mokas nin. Certe, per kuglo.

PASHALO: Kaj tio-ĉi ne plaĉas al mi. La kuglo povas fari ian truon. Mi dankas multe.

ZAFIRO: Sed kiel do?

PASHALO: Per la pugnoj!

ZAFIRO: Estu tiel. Antaŭen!

PASHALO: Haltu, haltu! Mi ne povas batali kun iu homo, se li ne diris al mi ian insulton, ke mi fariĝu furioza.

ZAFIRO: Tre bone. Mi estas preta servi al vi. Porko!

PASHALO: Mi estas porko? Antaŭen! Sed haltu! Kion signifas *porko*?

ZAFIRO: Besto, kiu la tutan tagon kuŝas en la koto.

PASHALO: Ĉu tio-ĉi estas insulto? La kotletoj el la porka viando estas tre bonaj. Diru ion alian.

ZAFIRO: Nu, vi estas azeno!

PASHALO: Mi estas azeno? Ha, tio-ĉi estas tro multe. Ni batalu! — Sed haltu! Kion signifas *azeno*?

ZAFIRO: Besto, kiu havas grandajn orelojn kaj kiun oni ŝarĝas.

PASHALO: Tio-ĉi ne estas insulto. La azeno estas la plej utila besto. Ion alian!

ZAFIRO: Alion? Nu, vi estas ŝtelisto!

PASHALO: Mi estas ŝtelisto? Tio-ĉi estas jam tro multe. Tiaj insultoj ne estas sufereblaj. Antaŭen! Sed haltu! Kion signifas ŝtelisto?

ZAFIRO: La ŝtelisto estas homo, kiu prenas malproprajn objektojn aŭ trompas alian kaj prenas lian proprajn.

PASHALO: Sed tio-ĉi nenion signifas. Vi mem diris al mi, ke vi ĉirkaŭŝtelas vian estron. Pro tio mi ne povas fariĝi furioza. Ni devas fari ion alian. Jen mi lasos tie-ĉi mian ĉapelon. Ni eliros kaj reveninte komencos disputi, kies estas la ĉapelo. Post la disputo ni komencos batali, kaj ni vidos, kiu venkos.

ZAFIRO: Estu tiel! Lasu vian ĉapelon. (*Ĉiuj eliras kaj revenas*).

PASHALO: Tiu-ĉi ĉapelo estas mia.

ZAFIRO: Ne, ĝi estas mia.

FORVAS: Ne, ĝi estas mia. (*Ili komencas batali*).

(*Kelkan tempon Forvas kaj Zafiro batalas. Pashalo restas indiferenta en la angulo kaj mokas ilin. Ili koleras kaj komencas insulti lin*).

PASHALO: Amikoj miaj! Lasu viajn insultojn kaj aŭskultu min. Tiu-ĉi batoj, kiujn vi manĝis, faras honoron al tiu juna knabino. Ĉu ne estas granda sensenco, ke ni batas unu alian pro la malinda virino. La homoj ekscios tion kaj mokos nin.

FORVAS: Sed kion do ni devas fari?

PASHALO: Ni devas ĵuri, ke ni abomenos ŝin por ĉiam.

ZAFIRO: Bone, Pashalo. Nun mi vidas, ke vi ankaŭ havas la spiriton. Via malkuraĝo estas kunligita kun la prudento.

PASHALO: Malfrue vi komprenis min. Tiel, donu al mi viajn manojn. Ni ĵuras, ke ni abomenos tiun-ĉi knabinon por ĉiam. Nun lasu ŝin veni por scii nian decidon.

ZAFIRO: Ŝi venas. Gardu vin, ne agu kontraŭ la ĵuro.

Sceno 8.

MARIETA: Nu, sinjoroj, kion vi decidis? Ha, vi abomenas min?

ZAFIRO: Jes, certe. Serĉu al vi aliajn amatojn. Prenu el via rezervo, ĉar ni jam perdis la deziron.

MARIETA: Ankaŭ vi, Zafiro, min abomenas, vi ne amas min plu, ne kompatas min! Ĉu vi forgesis nian amon? Jen, mi donas mian manon, ni estu amikoj! (*Daŭrante tiu ĉi parolado Pashalo kaj Forvas ripetas la vortojn: fortike! konstante!*)

ZAFIRO: Proponu ĝin al alia; vi ne trompos nin plu!

MARIETA: Kaj vi, Forvas, vi ankaŭ rifuzos min? Ĉu vi ne memoras viajn promesojn? Ĉu vi ne diris al mi, ke vi min amas, ke ĉio estas preta por nia edziĝo?

FORVAS: Tiu tempo jam pasis. Tiam ni estis solaj. Al ĉio sia tempo.

MARIETA: Vi estas tiom konstanta; pensu iom, ĉar vi pentos poste. Donu al mi vian manon.

FORVAS: Proponu ĝin al alia, mi abomenos vin ĝis la morto.

PASHALO kaj ZAFIRO: Brave, brave! fortike! konstante!

MARIETA: Venu almenaŭ vi, mia Pashalo!

PASHALO: Certe, nun estas mia vico.

ZAFIRO kaj FORVAS: Fortike, Pashalo, via ĵuro!

MARIETA: Lasu tiujn-ĉi malsaĝulojn kun iliaj ideoj. Donu al mi la manon!

PASHALO: Ne, ne, mi ĵuris.

MARIETA: He, lasu nun ĉiujn ĵurojn. Donu al mi la manon.

PASHALO: Mi deziras, sed ne povas; mi ĵuris.

MARIETA: Ĉiujn miajn esperojn mi dediĉis al vi, kaj vi abomenas min. Ĉu vi estas tiom kruela?

ZAFIRO kaj FORVAS: Konstante! via ĵuro!

PASHALO: Ne, mi ne estas kruela, mi ne abomenas vin, sed mi ĵuris. Lasu ilin foriri. Iru, sinjoroj, en la kafejon kaj atendu min, mi tuj venos.

MARIETA: Sekve, al mi nenio restas, krom la morto. Mi iros kaj falos en la puton kaj dronos.

PASHALO: Ne, ne, kion vi diris? En la puton pro tiuj-ĉi bagateloj!

ZAFIRO kaj FORVAS: Konstante! Ne forgesu vian ĵuron!

PASHALO (*mallaŭte*): Mi ne zorgas je vi! Ĉu mi estas malgranda infano?

MARIETA: Venu do, decidu! Alie mi min venenos.

PASHALO: Ne, ne! (*Al Zafiro kaj Forvas*). Ĉu vi ne aŭdas, kion ŝi diras? Ŝi volas veneni sin.

ZAFIRO: Lasu ŝin fari kion ŝi volas.

PASHALO: Ho, ne, tio-ĉi estas peko! Lasu min konsoli ŝin iom, sed vi iru, mi tuj trovos vin. (*Li prenas ŝin sub la brakon*).

FORVAS: Kiel! vi forgesis vian ĵuron? Ho, malhonora ĵurrompanto!

ZAFIRO: Tia do estas via konstanteco, ho malkuraĝulo!

PASHALO: Kia konstanteco? Mi volas ŝin havi, ŝi min, ĉio estas bona, kaj mi penis fari tiel.

ZAFIRO: Ĉar vi agis kontraŭ la ĵuro, mi vokos vin batali, malinda de la kompanio, besto sub la formo de l' homo. Mi iras for, ĉar via vido ekscitas en mi abomenon (*foriras*).

PASHALO: Ne maltrankviligu vin tiel, Pashalo scias, kion faras.

FORVAS: Kaj mi ankaŭ diros al vi, ke vi estas senkaraktera, senkonsciencia, mizera homo. Mi foriras, sed post kelka tempo ni nin renkontos, kaj mi rekompencos vin por via malnobleco.

PASHALO: Iru al diablo, lasu min en trankvilo. — Fine, mia amata, efektiviĝis nia celo. Sed sciuj, ke mi estas tre ĵaluzema kaj de nun mi petas vin forgesi la instruon de via onklino, alie ne vin liberigos de miaj manoj la tuta dekduo de viaj amatoj. Mi ne toleros, se iu alia faros atencon kontraŭ miaj rajtoj. Gardu vin, mia kara!

MARIETA: Ne, mia Pashalo; mi promesas al vi tion, ĉar tiu-ĉi okazo min instruis sufiĉe. Lasu min esti ekzemplo por tiuj, kiujn malbonaj konsiloj kondukas tien, kien ili preskaŭ kondukis min!

(El la libro *Die Neugriechische Volkssprache* von Carl Wied).

Tradukis V. Laskin.

—>:⊗:<—
Alternativoj.

Se edzo perdas la edzinon,
Li ploras pri la karedzin',
Aŭ pro la morto, kiu antaŭ
Dek jaroj ne forprenis ŝin.

Se daŭre nokto en la lito
La dormo flugas de junul',
Lin pikas-revoj pri fraŭlino,
Aŭ tute simple — aro-pul'.

Se iu pastron vizitadas,
Li povas vizitadi lin
Por preni konsiladojn piajn,
Aŭ kisojn de la pastridin'.

Se junvirino sian kolon
Kovradas per puntaĵtavol',
Ĝi pravas grandan modestecon,
Aŭ grandverukon sur la kol'.

Se bonedzin' al edz' fidelas,
Ĝi signas, ke ŝi amas lin,
Aŭ tute simple, ke aliaj
Neniel volas firti ŝin.

Se junfraŭlino multe ridas,
Ŝi estas eble gajperson',
Aŭ volas montri novajn dentojn
Ĵus akiritajn per la mon'.

Se kuracist' kuracas homon
Kaj sano venas re al li,
La malsanulo resaniĝas
Pro la rimed', aŭ malgraŭ ĝi.

Amiko.

—>:⊗:<—
Skizo.

En angula ĉambro de l' granda griza domo, en kiu trovis sin N-a societo de fratinoj de mizerikordo, iris malgaja meso pri nun mortinta fratino. La subiranta suno hele lumigis la ĉambron kaj ĝiaj radioj ludis sur ora kruco sur la brusto de l' pastro, trakuris tra malgajaj kaj lacaj vizaĝoj de fratinoj kaj haltis sur la manoj, kuŝantaj sur la brusto de la morta, kvazaŭ karesante ĝin.

La densaj ondoj de sankta fumaĵo portis sin tra malfermita fenestro kune kun sonoj de preĝa kantado kaj perdis sin ie makproksime, malproksime en

sunaj radioj... La vizaĝoj de fratinoj estis malgajaj; ili kutimis al la morto; ili tiel ofte fermas okulojn de la mortantaj. Sed la nun mortinta fratino estis ankoraŭ tiel juna, ŝi tiel volis vivi. Ŝi infektiĝis je la ftizo, je la malsano, per kiu, ŝajnis, spiris eĉ la dikaj muroj de la granda, griza domo, kaj mortis, kiam la neĝo komencis fluigi sur la montoj kaj disfloris la rozoj. La fratinoj ĉirkaŭigis ŝin per floroj; la arbaraj violoj kuŝis kun mallumeruĝaj rozoj, la laŭraj kaj cipresaj branĉoj trafleksis sin kune kun la glicinioj. La bela rozo alpremis sin al vango de l' morta, sur ĝiaj folietoj brilis ankoraŭ la gutoj de roso. La malgranda vizaĝeto, ĉirkaŭita de floroj, esprimis plenan trankvilecon. Sur akriĝantaj jam trajtoj kuŝis la sigelo de morto; oni povis legi sur la vizaĝo nek kontenton je tio, ke la eterna paco forpelis la teran suferon, nek bedaŭron, ke ŝi devis tiel frue forlasi la vivon.


La suno komencis sin klini al okcidento; ĝi ĉiam lumigis la ĉambron, sed ĝiaj radioj fariĝis palaj kaj la ondoj de l' sankta fumaĵo densiĝis. Malvarma venteto ekblovis de l' maro. Ĉio estis ĉirkaŭe silenta; la taga bruo eksilentadis. En la ĉambron, malmulte post malmulte, surdigante la odoron de l' sankta fumaĵo, enverŝiĝis la aromo de floroj kaj arboj.

Ĉio ĉirkaŭe parolis pri la printempo, pri la vivo, kaj la voĉo de l' vivo, kvazaŭ venkinte la sanktan kantadon, envenis en la ĉambron de la morta. El la fenestro vidiĝis montoj, bluaj pro nebulo kovrinta ilin per facila fumeto, vidiĝis ĝardenoj, — tuta maro de verdaĵo. Ĉio reviviĝis en la aero de printempo, ĉio voluptiĝis per ĝia aromo, sed tie-ĉi, en tiu-ĉi ĉambro regis la morto. La fratinoj klinis ankoraŭ pli malalte la kapojn kaj pli ofte krucigis. En la animo de ili fariĝis malgaje. Ĉu ne atendas ĉiun el ili tia frua morto post malgaja vivo? Ili enterigos amikinojn, kaj ree ilia vivo iros, kiel ĉiam: kapricaj malsanuloj, ilia morto, poste ree novaj vizaĝoj. Kaj ĉirkaŭe ĉio ĝojas, ĉio ŝanĝiĝas. Rapide trakuros la somero, post ĝi l' aŭtuno, poste vintro; ree printempe eksonos pli forte la akvofaloj, ree odoros la floroj... sed ili ne ĝojos je tio-ĉi... Ilia sorto estas vivi apud suferoj, kie morto venas, kiel ofta gasto kaj ŝtelas junajn vivojn.

Ili subite ekvolis foriri de tie-ĉi, foriri almenaŭ je unu tago, spiri freŝan aeron; forgesi ke en la mondo ekzistas malsanoj, morto... ankaŭ preni parton en festo de printempo, de juneco... Ili revis... La malgaja meso finiĝadis. El najbara ĝardeno aŭdiĝis la kanto de birdoj. El fenestro, mortante, portis sin sonoj de preĝa kantado, parolanta pri morto kaj je la renkonto enverŝis sin ĉiam pli laŭte la voĉo de l' vivo, la aromo de floroj, la brueto de folioj.

Jalto, bordo de l' Maro Nigra.

Aleksandrino Bernstein.



Pri ilustracioj en nia gazeto.


Diversaj personoj komunikis al la redakcio dezirojn kaj konsilojn pri ilustraĵoj en la gazeto.

S-ro I. Raĵĉef en Vidin, Bulgarujo, skribas:

Mi havas la honoron proponi sekvantan opinion. Se havas eblecon la Klubo Esperantista en Upsala, pligrandigu la formon de la ĵurnalo L. I. per ilustracioj. Mi pensas, ke ĵurnaloj ilustraciaj trovas pli multe da abonantoj. Se "L. I." estas "ilustrita", ĝi montrus pli multe da sukcesoj kaj havus pli grandan nombron da amantoj.

S-ro C. W. v. Sydow en Lunnevad, Sjögestad, Svedujo, skribas en preskaŭ la sama senco:

Mi kredas ke bona propagandilo estus riĉe ilustrita kristnaska numero de L. I. Multaj aĉetas kristnaskajn numerojn en alilandaj lingvoj nur pro la ilustracioj sen koni la lingvon, en kiu la libroj estas verkitaĵoj. Se ili aĉetis esperantan libron (kun sekvanta vortareto kaj gramatiko), ili pro scivoleco legas la rakontojn kaj fariĝas esperantistoj.



Kion mi pensos?

El "Versaĵoj en prozo" de I. S. Turgenev.


Kion mi pensos tiam, kiam mi devas morti, se mi povus tiam pensi? Ĉu mi pensos pri tio, ke mi malbone uzis vivon, tradormis ĝin, ne povis provi ĝiajn donojn? — "Kiel? ĉu ĝi estas jam morto? Tiel rapide? Ne eble! Sed mi ja ne havis tempon fari ion? Mi nur volis fari." Ĉu mi memoros la pasintan tempon, ĉu haltos miaj pensoj je travivitaj de mi momentoj, je karaj imagoj kaj personoj? Ĉu alvenos al mia memoro miaj malbonaj faroj — kaj mi eksentos en mia animo la brulantan malĝojon de malfrua repento? Ĉu mi pensos pri tio, kio atendas min post morto? ĉu efektive atendas min tie io?

Ne... ŝajnas al mi, ke mi pensos ne pensi kaj min okupos kontraŭvole per ia bagatelo, por atenton fortiri de minaca mallumo, kiu nigriĝas renkonte.

Mi vidis, kiel unu mortanto plendis, ke oni ne volas doni al li nuksojn, kaj nur tie, en la profundo de liaj estingitaj okuloj batis sin kaj tremis io, kiel disbatita flugilo de birdo mortinta pro vundo.

Aŭgusto 1879.

Trad. Aleksandrio Bernstein.



De niaj abonantoj.

Mi tute konsentas la penson, jam kelkfoje eldiritan sur la folioj de Via estimata gazeto, ke la penoj de l' agentoj de la lingvo internacia devas esti laŭeble faciligitaj. Tial mi proponas, ke ĉiu agento havu la rajton doni al la Redakcio almenaŭ unu adreson de legejo aŭ de ia alia instituto aŭ eminenta persono *de sia urbo* *) por ke la Redakcio sendu laŭ adreso donita unu ekzempleron de "L. I." senpage.

Mi pensas, ke neniu povas esti pli kompetenta ol sinjoroj agentoj prijuĝi, kie nia agado povas esti pli fruktoporta, kaj la Redakcio ne rifuzos, kiel mi esperas, liveri kelke da ekzempleroj por tia afero kiu, oni devas pensi, estos pli konvena ol persona rabato, kiu laŭ la esenco devas esti nepre tute arbitra.

V. Shmurlo. Agento en Tomsk.

* * *

Nelonge mi fariĝis agento de la lingvo "Esperanto", kaj per ĉiuj miaj fortoj mi penas propagandi nian lingvon ĉie, kie mi nur povas. Ekzemple mi aĉetadas propagandajn broŝuretojn kaj disdonas ilin en la lernejojn kaj legejojn. Mi anoncas inter miaj konatoj, ke mi instruas senpage al ĉiuj dezirantaj nian karan lingvon. Sed unu malhelpaĵon mi renkontas tie ĉi. Laŭ mia opinio "Ekzercaro" n-ro 72 estas la plej bona lernolibro. La n-ro 77 servas nur kiel helpantaj vortaro kaj reguloj, sed ne kiel


*) Mi proponas por la urbo Tomsk la legejon de P. Makuŝin.

ĉefa lernolibro. D-ro Zamenhof jam ne havas unu ekzempleron da n-ro 72, kaj mi ne havas la eblecon instrui la dezirantojn, kies nombro plimultiĝas kaj plimultiĝas. Tial mi tre petas ĉiun esperantiston, kiu havas almenaŭ unu ekzempleron da "Ekzercaro", sendi ĝin al mi por mono, kaj mi estos al li kore dankanta

Mia adreso: *Elisavetgrad* (Rusujo). *G. Slucki*.

* * *

Mi tre petas ĉiun aŭtoron kaj tradukinton, ke ili volu sendadi po kelkaj ekz. da siaj verkoj, por la vendaĵo, laŭ la adreso: *Smolensk* (Rusujo) al Aleksandro Zakrĵevski, agento de l' Esperanto, strato *Oficerskaja Sloboda* domo de Erdeli. Ili povos ricevi de mi kvitancon de la ricevo de iliaj libroj.



Informejo de esperantistoj.

Deziras korespondadi:

Kun esperantistoj — *Thorolf Hedborg*, studianto. *Kristinehamn*. Svedujo.

ANONCOJ.

La gazeton *Lingvo Internacia* oni abonas:

- en **Ameriko** ĉe R. Geoghegan, *Tacoma*, Washington, U. S. A.
 - „ **Francujo** ĉe L. de Beaufront, *Epernay*, Marne.
 - „ **Germanujo** ĉe W. H. Trompeter, *Schalke*, Westfalen.
 - „ **Hispanujo** ĉe A. Serapio, Pontevedra, *Silleda*.
 - „ **Portugalujo** ĉe d-ro Costa e Almeida, *Rezende*.
 - „ **Rusujo** ĉe V. Gernet, Jamskaja, 92, *Odessa*.
- Ĉe tiuj ĉi sinjoroj oni mendas la gazeton kaj pagas al ili la abonpagon.
En aliaj landoj oni mendas la gazeton aŭ per la poŝto aŭ rekte ĉe la redakcio, adr. *Uppsala*. La monon oni plej bone alsendas per poŝta mandato.

Depot' da semoj de M. I. Fedorovski

(Rusujo, Moskva. Mjasnickaja, dom Staĥejeva)

vendas ekonomiajn, legomajn, florajn kaj aliajn semojn de la plej bona eco. La plena katalogo estas elsendata por 30 kop. en poŝtsignoj; al eksterrusaj aĉetantoj — senpage. La eksterrusaj mendoj estas akceptataj en la lingvo Esperanto.

En Rusujo, gub. de Niĵnij-Novgorod, 40 verstojn de la rivero Volga

oni vendas

7000 desatinojn da tero, en tiu nombro 3000 desatinojn da kverkaro, taŭga por ekspluatado. Kosto: unu miliono kvarcent miloj da rubloj. Por informoj oni sin turnu: Moskva, Mjasnickaja, Magazeno de semoj de Miĥ. Ivan. Fedorovski.

Enhavo de tiu ĉi numero.

	paĝo		paĝo
<i>Lev Davidoviĉ</i> , de <i>N. Slouŝĉ</i> . . .	33	<i>Skizo</i> , de <i>Aleksandrino Bernstein</i> . . .	45
<i>Al ĉiuj esperantistoj</i> , de <i>V. Langlet</i> . . .	34	<i>Pri ilustracioj en nia gazeto</i> . . .	46
<i>Novajoj</i>	35	<i>Kion mi pensos?</i> de <i>Aleksandrino Bernstein</i> (trad.)	47
<i>La vesperstelo</i> , de <i>D-ro Ebner</i> (trad.) . . .	37	<i>De niaj abonantoj</i>	47
<i>Al Anĝelo</i> , de <i>D. Jegorov</i>	38	<i>Informejo</i>	48
<i>Tri suboficiroj</i> , de <i>V. Laskin</i> (trad.) . . .	38	<i>Anoncoj</i>	48
<i>Alternativoj</i> , de <i>Amiko</i>	45		